

## Ĉefaj decidoj en la 40-a Ĝenerala Konferenco de UNESKO novembre 2019

En la literaro UNESKO, „E” signifas Edukado kaj multaj tagorderoj rilatis al edukado tra la mondo:

- alfabetigo de junuloj kaj plenkreskuloj: reviziita teksto ĉar malgraŭ la streboj de la landoj, en multaj mondopartoj restas analfabetoj
- edukado por daŭripova disvolvigo kaj protekto de nia planedo
- internacia klasifikado de la trejnprogramoj por instruistoj
- atentigo pri novaj edukelementoj per kreo de Mondaj Tagoj (pri matematiko, inĝenierado por daŭra disvolvigo, arto, logiko); mondaj semajnoj (pri enkonduko al amaskomunikiloj kaj informado; pri edukado al artoj), jaro pri fundamentaj sciencoj kaj disvolviĝo.
- antaŭpreparo de dokumento pri etiko en artefarita inteligenteco.
- laŭ propono de Francio, monda tago kontraŭ perforto kaj turmentado en lernejoj. Se antaŭe lernejoj facile primokis dikulon, rufharulon ks rekte dum la paŭzoj, nun pere de la reto, estas facile anonime turmentadi lernejanon, kiu ĝenerale preferas silenti, ne raporti al la geinstruistoj aŭ al la gepatroj por ne riski plian turmentadon. Ne venas al ili la ideo simple ne malŝalti la komputilon... La ideo estas atentigi la lernejanon, sed ankaŭ la edukistojn pri la dramo, post kelkaj sinmortigoj de infanoj, kiuj ne plu toleris tian trumentadon.

*Renée TRIOLLE, triolle.renee@wanadoo.fr*

Dum la 40-a Ĝenerala Konferenco de UNESKO, la 13-an de decembro 2019, la Instituto pri Statistikoj de UNESKO raportis pri la donitaĵoj. Se ĉiuj akcentis la gravan rolon de edukado, la 4-a inter la Celoj por Daŭripova Disvolviĝo, konstatas, ke nur 5 el 10 lernantoj finas mezgradan lernejon. Enkondukiĝis nova metodologio por difini la kapablojn, ne forgesante laŭ la nuna slogano, virinojn kaj handikapulojn, sed multaj landoj ne komunikas donitaĵojn. Tamen nur la Ministrino pri Edukado el Grekio atentigis pri neatento pri la homaj valoroj de la lernejoj.

Mi faris la demandon: kiel statistiki kaj ciferumi la homajn kvalitojn (kapablo kun-labori, emo je interrilatoj, kritikemo) pri kio parolis la greka ministrino, kiuj supozeble pli utilis al estonta mondcivitano ol bonaj rezultoj en matematiko aŭ dominanta lingvo. Respondo estis, ke UNESKO funkcias laŭ interkonsento kaj ne eblas interkonsenti pri tiuj kvalitoj...

Kelkajn tagojn poste aperis la rezultoj de PISA (programo Internacia pri sekvo de akiritaĵoj ĉe lernejoj) kie brilas aziaj lernejoj (el Japanio, Koreio, Singapuro ktp) pri kiuj ni scias, ke post la oficialaj lernejaj horoj, ili plu studas en privataj kursoj do sukcesas en matematiko aŭ angla lingvo, sed ĉu ili same sukcesos en sia privata vivo?

*Renée TRIOLLE, triolle.renee@wanadoo.fr*